# PÔLE INTERNATIONAL DE LA PRÉHISTOIRE

PÔLE INTERNATIONAL
DE LA PRÉHISTOIRE

30, rue du Moulin
24620 Les Eyzies-de-Tayac
Tél : 05 53 06 06 97
contact@pole-prehistoire.com
www.pole-prehistoire.com

Senpaga publika parkejo,
19, avenue de la Forge
Koordinataro GPS :
N 44° 56.1312 - E 01° 01.1536

**Malferma horaro :**

De la 2a de Januaro ĝis la 30a de Aprilo kaj
de la 1a de Oktobro ĝis la 31a de Decembro:
9 h 30 - 17 h 30
Malfermita sabate

De la 2a de Majo ĝis la 30a de Septembro:
9 h 30 - 18 h 30

Malfermita la 1an de Januaro,
la 1an de Majo kaj la 25an de Decembro










ESPERANTO

INFORMIĜI KOMPRENI EKLERNI

# PÔLE INTERNATIONAL DE LA PRÉHISTOIRE







SENPAGA ENIRO

Prahistorio:
transdonenda
heredaĵo

PÔLE INTERNATIONAL DE LA PRÉHISTOIRE

La Centro, malfermita al la publiko en Julio 2010, situas en la vilaĝo « Les Eyzies-de-Tayac », sur la « historia » vojo kunliganta Périgueux kun Sarlat, apud la Nacia Prahistoria Muzeo.

Kerne de 400 000 jaroj da homa historio, ĝi ambicias valorigi kaj igi alirebla al ĉiuj publikoj la valon de la rivero Vézère, universalan heredaĵon, riĉan je multaj plejgravaj prahistoriaj situoj, el kiuj dek kvin estas enskribitaj en la Tutmonda Heredaĵo de Unesko.


Daŭra Poluso pri informado kaj animado, la Akcepto-Centro trafe integriĝas en grandkvalitan pejzaĝon, inter klifoj, vegetalaro kaj rivereto.


Interna « strato » ebligas al la vizitanto libere vagi en la tuta konstruaĵo. Ĉiu imagu sian propran vojaĝon en prahistorion. Estas la ideala startpunkto por prepari aŭ komenci restadon en la « Lando de la Homo ».










**1 :** Enirejo - **2 :** Interna strato, akceptejo - **3 :** Prahistorio en la valo Vézère
**4 :** Dokumenta spaco - **5 :** Butiko

Necesejoj
Lifto

**6 :** Portempaj ekspozicioj - **7 :** Aŭditorio - **8 :** Akceptejo
**9 :** Spaco por kafpaŭzo / trinkaĵoj - **10 :** Pedagogia spaco kaj animado

### INTERNA STRATO, AKCEPTO-SPACO

Platformo pri informado kaj orientado proponanta personigitan akcepton en pluraj lingvoj por privilegia aliro al ĉiuj prahistoriaj riĉaĵoj de la Vezera valo, kaj al la multaj kulturaj kaj edukaj agadoj.

### PRAHISTORIO VEZERA VALO

Spaco de malkovro de prahistorio kaj prezentado de la situoj de la Vezera valo. Ĝi proponas la originalajn rimedojn de noviga scenskribado por unua alproksimiĝo al la prahistorio : surmuraj freskoj kaj dermoplastiaĵoj, filmoj sur gigantaj ekranoj, tridimensia maketo kun tuŝosentaj ekranoj, informaj kolonoj je la dispono de la vizitantoj.

### DOKUMENTO-SPACO

En tiu ĉambro eblas konsulti plurajn milojn da verkoj, revuojn, lumdiskegojn pri la prahistorio.
La kibernetika spaco ebliganta la aliron al interreto (konektitaj komputiloj kaj spoto Wi-Fi) proponas aron de numeraj rimedoj al ĉia publiko (junulara spaco, virtualaj ekspozicioj, temaj dosieroj, kolektiva katalogo de la dokumentaj regionaj rimedoj pri prahistorio...)

### LA BUTIKO

Edukaj artikloj kaj ludoj, porjunalaraj albumoj, originalaj kreitaĵoj pri la temo prahistorio.

### PORTEMPAJ EKSPOZICIOJ

Loko destinita por la aranĝo de ekspozicioj kun kultura, arta kaj eduka karaktero pri la temo de la prahistorio kaj de la Vezera valo.

### AŬDITORIO

Amfiteatro kun 230 sidlokoj, tute ekipita por la projekcio de dokumentaj filmoj, la organizado de prelegoj, spektakloj kaj kolokvoj pri la prahistoria temo, kaj ankaŭ por la akcepto de kongresoj.

### PEDAGOGIA SPACO KAJ ANIMADO

Ĉirkaŭ reprodukto de arkeologiaj prifosejoj, ĝi arigas atelierojn temantajn pri arkeologiaj sciencoj.

